

La Bulteneto

Numero 13 • René de Saussure - Jaro 2018

Kun artikolo pri la 650-jariĝo de Aŭstria Nacia Biblioteko

ISBN 978 3 903247 02 4



MIRINDA!

LA KOLEKTO HEIDI HORTEN EN LEOPOLD-MUZEO



Sur la unua paĝo direktoro de Leopold-Muzeo mag. Hans-Peter Wipplinger kaj d-ino Agnes Husslein-Arco, la kuratorino de la ekspozicio, kaj du ekzempleroj de la katalogo „WOW!“
Foto Walter Klag.



Marc Chagall, La Amantoj, 1916
Kopirajto © Courtesy Heidi Horten - Kolekto
© Bildrecht, Vieno, 2018



Ŝi estas la prezidanto de aŭstria glacihokea klubo, subtenas malavare bonfarajn organizojn kaj donas monon por la medicina esplorado: Heidi Goëss-Horten, unu el la plej riĉaj homoj en Aŭstrio. Nun la unuan fojon ŝi donis la permeson ekspozicii parton de sia kolekto de pentraĵoj kaj aliaj artaĵoj en Leopold-Muzeo en Vieno ĝis la 29a de julio 2018. La titolo de la ekspozicio estas „WOW“, citaĵo el komiksoj de la poparta artisto Roy Lichtenstein.

Inter la 170 objektoj troviĝas laboraĵoj de Paul Klee, Gustav Klimt, Andy Warhol, Marc Chagall, Erwin Wurm kaj multaj aliaj pentristoj de la ekspresionismo ĝis la nuntempo. Multajn el tiuj artverkoj oni ĝis nun ne vidis en publika loko. Horten vivas ĉe Wörther-Lago en la aŭstria federacia lando Karintio en palaca vilao, kiu estas ornamita per verkoj de la plej famaj pentristoj. Daŭre ŝi vivas meze de siaj artobjektoj, sed nun por duona jaro parto estas for el ŝia ĉiutaga vivo.

Ĉirkaŭ la vilao estas skulptaĵa ĝardeno. Unu el tiuj objektoj staras en la ekspozicio: "Singe Avisé très grand", do Simio saĝa tre granda, skulptita 2005 ĝis 2008 fare de la artistparo Les Lalanne. Estis malfacile transporti tiun pezan, du metrojn altan bronzan objekton de Karintio al Vieno.

La kuratorino de la ekspozicio, d-ino Agnes Husslein-Arco, akompanas sinjorinon Horten jam de jardekoj. Husslein konsilis ŝin okaze de aŭkcioj, en kiuj Horten anonime ofertis. La monon, kiun Horten heredis de sia edzo, ŝi elspezis parte por la aĉeto de altkvalitaj pentraĵoj kaj aliaj artaĵoj. Dum iu aŭkcio ŝi aĉetis la bildon "Les Amoureux" (La Amantoj) de Chagall, kiu iĝis ŝia plej ŝatata. Ŝia plej grava deziro estas disponigi arton al ĉiuj.

La ampleksa katalogo de la „WOW“- ekspozicio ebligas kvazaŭ bonan rondiradon, trankvilan rerigardadon hejme kaj informadon.

Renate kaj Walter Klag



„La arto, kun kiu mi vivas de multaj jaroj, iĝis konkreta arta historio. Tiun travivaĵon mi volas dividi kun aliaj homoj en la kadro de la ekspozicio en Leopold-Muzeo. Ankaŭ estis mia grava deziro, subteni la programojn de la arta perado kaj garantii senbaran aliron al la ekspozicio. Por mi arto havas ligantan elementon. La penso, ke mi povas kontribui per tiu projekto starigi ponton inter la generacioj kaj inter diversdevenaj homoj, donas al mi grandan ĝojon.

Heidi Goëss-Horten



La kolektistino Heidi Goëss-Horten

Heidi Jelinek naskiĝis 1941 en Vieno kiel filino de gravuristo. En koktelejo ĉe la karintia Wörther-Lago ŝi konatiĝis kun la 32 jarojn pli aĝa Helmut Horten (1909–1987), kiu posedis magazenan ĉenon en Germanio. Ili geedziĝis 1966. Post la morto de Helmut Horten ŝi heredis lian posedaĵon en la valoro de aktuale ĉirkaŭ du miliardoj da eŭroj. Post dua, malsukcesa geedziĝo ŝi iĝis la edzino de Karl Anton Goëss en la jaro 2015. La antaŭuloj de Karl Anton Goëss estis portugalaj nobeloj kun la nomo Gois.


Ekde 1971 Heidi Horten estas vica prezidantino en la fondaĵa konsilantaro de Helmut Horten-fondaĵo, kiu subtenas la medicinan esploradon. Ŝi estas glacihokea fano kaj meceno kaj honora prezidanto de la Klagenfurta Glacihokea Asocio EC KAC ekde 2010.

1996, dum aŭkcio en Londono, ŝi akiris 30 pentraĵojn de famaj pentristoj. En tiu periodo la arta merkato estas en senprospera stato, sed poste la prezoj de tiuj artaĵoj rapide kreskis.

Renate kaj Walter Klag



Ekspozicio WOW!
Kopirajto © Courtesy Heidi Horten - Kolekto
© Bildrecht, Vieno, 2018



Lyonel Feininger, La Geedziğa Vojaço, 1908.
© Courtesy Heidi Horten Collection © Bildrecht, Wien, 2018

650 JAROJ AŬSTRIA NACIA BIBLIOTEKO



Libroj kaj gazetoj en Esperanto
el Aŭstria Nacia Biblioteko.
Guglo > önb trovanto



La evangelia libro de Johano de Tropaŭ
 Evangeliar des Johannes von Troppau, Prag, 1368



La fermilo de tiu libro kun la literoj AEIOU
 kaj la jarindiko 1446

La Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB¹) en Vieno estas historie tre eminenta, sed ankaŭ vige vivanta biblioteko, kiu daŭre plijuniĝas. Kolektiĝas ĉio, kio aperas en presita aŭ cifereca formo en kaj pri Aŭstrio. Specialaj fakoj estas la kolektoj de papirusoj, globusoj, muzikaĵoj kaj dokumentoj en aŭ pri planlingvoj.

La adreso de ANB estas Josefsplatz 1 en la unua distrikto. La nomo de tiu placo rilatas al la germana imperiestro Jozefo la dua², la filo de Maria Theresia.

Ne ekzistas dokumento pri la fondo de ANB, sed ekzistas “fonda kodekso”³ el la jaro 1368. Tiu kodekso - la evangelia libro de Johano de Tropaŭ - estas la unua libro en la privata kolekto de la Habsburgoj, nome de la duko Albrecht la tria⁴. La literoj estas el oro, la skribo estas gotika frakturo. En la libro aperas la blazonoj de la tiamaj aŭstria landoj: Aŭstrio, Karintio, Stirio kaj Tirolo.

Frederiko la tria⁵, kiu poste posedis la libron, skribigis sur la unuan paĝon la vokalojn A E I O U kaj la jarindikon 1444. Du jarojn poste la libro ricevis orumitan arĝentan garnaĵon kun jarindiko 1446 sur la fermilo. A E I U O oni klarigas ekzemple per latine AUSTRIAE EST IMPERARE ORBI UNIVERSO – Al Aŭstrio apartenas regi la tutan mondon. Tiun akronimon oni vidas en multaj lokoj de la monarĥio kaj ĝi indikas, ke Frederiko estis la posedanto.

¹ Österreichische Nationalbibliothek ÖNB.

² Jozefa Placo, germane „Josefsplatz“. Imperiestro Jozefo la 2-a estis reformema germana imperiestro kaj regis 1780-1790. Maria Theresia [terézia], ties patrino, ofte pruntis librojn el la imperiestra biblioteko. Tion pruvas ŝiaj mane skribitaj notoj. Ŝi regis 1740-1780.

³ Kodekso estas lukse ilustrita kaj ornamita manskribita libro.

⁴ Albreĥt la tria regis 1365-1395.

⁵ Germana imperiestro, regis 1440-1493.

En tiu tempo oni parolis la unuan fojon pri „biblioteko“; ĝi konsistis el 50 ĝis 60 libroj hermetike fermitaj en diversaj kestoj, kiujn Frederiko transportis kun si dum siaj vojaĝoj de unu rezidejo al alia. La libroj estis parte mane skribitaj, parte jam presitaj kaj estis tiam objektoj de prestiĝo, malpli fonto de scio.

La evangelia libro estas la centra objekto de la ekspozicio „Trezorejo de la Scio“ (Schatzkammer des Wissens), kiu viziteblas ĝis la 13a de januaro 2019. La evangelia libro de Tropaŭ estas la ekspoziciita „objekto de la monato“ en januaro 2018 kaj en januaro 2019. La sekvaj objektoj de la monato estas:

En februaro 2018 papiruso el la dua jarcento post Kristo, kiu dokumentas la komercajn rilatojn inter Egiptio kaj Hindio.

En marto 2018 du mandragoroj (Alraunen), kiuj havas la formon de homaj figuroj.

En aprilo 2018: Unu folio el la jaro 1791 kun muziknotoj de la ne finkomponita rekviemo de Mozart⁶.

En majo: Akvarelo-guaŝo el 1815 montranta hoko-lilion crinum ornatum⁷ kaj akvarelo el 1799 montranta bengalan tigron.

En junio: Unu folio de la 42-linia biblio de Gutenberg⁸.

En julio: Presita mapo el la jaro 1513 de la tiam konata mondo.

En aŭgusto: Foto el la jaro 1858 montranta la regionon de la nuna Sveda Placo en Vieno kun la malkonstruata urba muro.

En septembro: Tre malneta poema manuskripto el la jaro 1984 de la aŭstria verkistino Ingeborg Bachmann⁹.

⁶ Wolfgang Amadeus Mozart [mocart], komponisto, 1756-1791.

⁷ Crinum ornatum (latina): Crinum [krinum] = har(ar)o, ornatum = ornamita.

⁸ Johannes Gutenberg, ĉ. 1397-1468, inventinto de la libropresado.

⁹ Ingeborg Bachmann [íngeborg baĥman], 1926-1973, aŭstria verkistino.

En oktobro: Unu paĝo el la „Libro de la Kontraŭvenenoj“, 13a jarcento, en araba skribo kaj bildoj, kiuj montras diversajn serpentojn.

En novembro: Tabula Peutingeriana (vidu sube).

En decembro: Akvarelo montranta la monaĥejon Admont.



Biblio de Gutenberg, Mainz, ĉirkaŭ 1454

Por eviti damaĝojn estas urĝe necese, ke kelkaj objektoj estas ekspoziciataj nur dum unu monato, kiel ekzemple la muziknota folio de la rekviemo de Mozart, la biblio de Gutenberg kaj Tabula Peutingeriana; tiu antikva mapo montras la stratan reton de la romia imperio; kvankam temas pri kopio el la 12-a jarcento, ĝi estas monda dokumenta heredaĵo de UNESKO, same kiel la Ora Buleo¹⁰. Tiu buleo estas mezepoka latinlingva jura dokumento de Karolo la kvara, imperiestro de la Sankta Romia Imperio, eldonita en Metz en 1356. Ĝi fiksas la elektadon de la imperiestro fare de la tiam sep princoj, kiuj havis la elektorajton.

¹⁰ germane Goldene Bulle.

La privata habsburga biblioteko evoluis en la sekvaj jarcentoj al la kortega biblioteko kaj poste al la nacia biblioteko.

La germana imperiestro Maksimiliano la unua¹¹ tre ŝatis librojn. En la ekspozicio oni vidas liajn verkojn “Theuerdank” (signifas nobla pensado) kaj “Weißkunig” (signifas saĝa reĝo). Ambaŭ verkoj estas elstaraj ekzemploj el la pionira tempo de la libropresado komence de la 16-a jarcento. La privata habsburga biblioteko enorme evoluis fare de Maksimiliano. Li tre subtenis la libropresadon kaj komisiis famajn artistojn el la sudgermanaj landoj, ekzemple Albrecht Dürer¹². Li edzinigis Maria de Burgund, poste Bianca Maria Sforza. Sekve la biblioteko pliriĉiĝis je gravaj majstroverkoj de la franca kaj itala libroarto. La administranto de la biblioteko Conrad Celtis¹³ parolis la unuan fojon pri “Bibliotheca Regia”, do reĝa biblioteko.

Per la eldono de multaj libroj Maksimiliano celis al eterna memoro post sia morto.

Sub la regado de Maksimiliano la dua¹⁴ la biblioteko troveblis en diversaj lokoj, interalie en malsekaj ĉambroj de la Minoritana Monaĥejo (Minoritenkloster), poste en la pli taŭga ejo Harrach-domo, kio estis parto de la imperiestra palaco Hofburg. Tie ĝi restis pli ol cent jarojn.

La nederlanda erudito Hugo Blotius¹⁵ iĝis la unua oficiala direktoro de la imperiestra biblioteko. Li realigis la unuan katalogon kun 7379 notoj pri libroj. Blotius proponis, ke unu ekzemplero de ĉiu libro, kiu presiĝis kun imperiestra privilegio, devas esti liverata al la imperiestra biblioteko. Tiu-

¹¹ Maksimiliano la unua, germana imperiestro, 1459-1519, filo de Frederiko la tria.

¹² Albrecht [albreĥt] Dürer, 1471-1528.

¹³ 1459-1508

¹⁴ Maksimiliano la dua, germana imperiestro, 1527–1576.

¹⁵ Hugo Blotius, 1533-1608, nederlanda juristo kaj bibliotekisto.

ĉi reglamento validas principe ankoraŭ hodiaŭ. Ĉiu publicaĵo, eĉ lokaj gazetoj, notpaperetoj de famaj verkistoj, faldfolioj, afiŝoj kaj tiel plu devas esti kolektataj de ANB.

En la jaro 1655 pro monomanko la komercista familio Fugger en Aŭgsburgo devis vendi 15 mil librojn. Ilin aĉetis imperiestro Ferdinando la tria¹⁶ kontraŭ 15 mil guldenoj, kvankam akceptebla prezo estintus 40 mil guldenoj.

Peter Lambeck¹⁷ estis la bibliotekestro ekde 1663 kaj samtempe imperiestra historiografo. Por pliampleksigi la bibliotekon li ricevis ĉiujare 1000 guldenojn de la imperiestro. Lia plej grava sukceso estis la transporto de la biblioteko en la burgo de Ambras al Vieno. Tiu burgo situas proksime de Innsbruck en Tirolo. Post la forpereo de la tirola linio de la Habsburgoj li kondukis 583 manskribaĵojn kaj 1500 presaĵojn per ŝipo sur la riveroj Inn kaj Danubo al Vieno. La 600 km longa droŝka veturo de Vieno ĝis Ambras tiam daŭris almenaŭ 14 tagojn, hodiaŭ per aŭto nur ok horojn.

Aliaj en Ambras kaŝitaj verkoj venis nur en la jaro 1806 al Vieno, interalie la „Ambrasa Libro de la Herooj“.

La nuna palacosimila biblioteka domo kiel parto de Hofburg ĉe Jozefa Placo por bonteni la tutan libraron konstruiĝis 1723 ĝis 1726 en baroka stilo. Centra parto estas la Pompa Salonego, kies ideoriĉa konstruado celas al kvar funkcioj: Glorejo por imperiestro Karlo la sesa¹⁸, biblioteko, librodeponejo kaj legejo. En la mezo de la salonego staras apoteoze diosimila statuo de la imperiestro. Karlo volis starigi monumenton de la scio, ne memorigilon por militaj sukcesoj.

¹⁶ Regis kiel germana imperiestro 1637-1657.

¹⁷ Peter Lambeck [lambek], 1628-1680, naskiĝis en Hamburg.

¹⁸ Karlo la sesa, germana imperiestro, regis 1711-1740.



La baroka biblioteko, Josefsplatz 1

Tiam unu el la elstaraj objektoj estis la kolekto de Princo de Eŭgeno¹⁹, kiu ampleksas 15 mil librojn, kiuj ankoraŭ hodiaŭ troviĝas tie. La salonego estas arĥitekta majstroverko de la eminenta arĥitekto Bernhard Fischer von Erlach²⁰. Ĝi estas detale strukturita per kolonoj, arkoj, balkonoj, libroŝrankoj, pli alte aranĝitaj fenestroj kaj plafonaj freskoj. La finkonstruado okazis sub la direktado de la filo Josef Emanuel Fischer von

¹⁹ Eŭgeno de Savojo, 1663-1736, franca nobelo, militestro de la habsburga Aŭstrio.

²⁰ Bernhard Fischer von Erlach [fiŝer fon erlaĥ], arĥitekto, 1656-1723.

Erlach²¹. La freskojn pentris Daniel Gran²². Baldaŭ evidentiĝis, ke en la nova domo ne eblis stoki la estontajn akiraĵojn. La lokoj teretaĝe sub la Pompa Salonego servis kiel remizo por ĉaroj. La kela etaĝo estas 10 metrojn sub la nivelo de la Pompa Salonego kaj estas ne aerumebla.



Imperiestro Karlo la sesa sur arĝenta Talero el la jaro 1729

1745 Gerard van Swieten²³ iĝis direktoro de la imperiestra biblioteko kaj aĉetis multe da novaj verkoj, ne nur libroj, sed ankaŭ sciencaj eksponaĵoj. Krome li bindis kaj renovigis multajn verkojn.

1780 ĝis 1781 Gottfried van Swieten²⁴ reorganizis la katalogon per novigo: Por ĉiu libro li notis la informojn sur aparta slipo - entute estas 300 mil -

²¹ Joseph Emanuel Fischer von Erlach [jozef emánuel fiŝer fon erlaĥ], 1693-1742, arĥitekto, filo de Bernhard Fischer von Erlach.

²² Daniel [dániel] Gran, 1694-1757, aŭstria pentristo de la baroka epoko.

²³ Gerard van Swieten [fan sviten], 1700–1772, nederlanda reformema kuracisto, propra kuracisto de imperiestrino Maria Theresia.

²⁴ Gottfried van Swieten [gotfrid fan sviten], 1733–1803, filo de Gerard van Swieten, aŭstria diplomato kaj direktoro de la imperiestra biblioteko.

kaj ordigis ilin alfabete en 205 skatoloj, kiujn oni nomas kapsuloj. Temas pri la unua slipa katalogo en la historio de la bibliotekoj. Ĝi estas la bazo por scienca okupiĝo pri biblioteka laboro. Slipara katalogo povas esti daŭre aktualigata.

En la 19-a jarcento eminentaj slavaj sciencistoj laboris por la imperiestra biblioteko. La slavaj kolektoj kaj la pliampleksigo de la kolektoj de papirusoj, manskribaĵoj, mapoj, muzikaĵoj kaj portretoj kaj presaĵoj iĝis la fundamento de la nuna multifaceta objektaro de ANB.




En la Pompa Salonego (Prunksaal)
troviĝas 200 mil libroj el la jaroj 1501 ĝis 1850.
En la mezo la statuo de imperiestro Karlo la sesa²⁵.

²⁵ La statuon skulptis verŝajne Antonio Corradini [antónio koradini] en la jaro 1735. Li naskiĝis 1688 en Venecio kaj mortis 1752 en Napolo.

Komence de la 19a jarcento la kortega biblioteko organiziĝis denove kaj estis baldaŭ unu el la plej gravaj kaj ampleksaj humansciencaj bibliotekoj de la mondo. 1928 la Esperantomuzeo iĝis parto de la biblioteko. En la 1930-aj jaroj oni planis konstrui 26-etaĝan centran bibliotekon en la 9-a distrikto por la libroj de la nuna ANB, Teknika Universitato kaj Universitata Biblioteko. Pro financaj kialoj la plano ne realiĝis.

1992 inaŭguriĝis subtera librostorejo sub Burga Ĝardeno. 2005 translokiĝis la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la malfacile trovebla ejo sub Miĥaela Kupolo en la bele renovigitan Palacon Mollard en Herrengasse 9. Tie la Nacia Biblioteko disponas pri moderna, sekura kaj klimatizita loko por deponi librojn kaj aliajn objektojn.


En Palaco Mollard troviĝas ankaŭ la Globusa Muzeo kaj la Kolekto de Muzikdokumentoj.



Sliparo en skatolo,
kiun oni nomas ankaŭ „kapsulo“ aŭ „falsa libro“.



Libroj en Pompa Salonego



Reisebericht

Beschreibung des Zettelkatalogs
Beschreibung einer Reise durch Deutschland
und die Schweiz, im Jahre 1781

Vierter Band
Friedrich Nicolai
Berlin und Stettin: 1784

Priskribo de la slipara katalogo, 1784

Multaj libroj aperas hodiaŭ en cifereca formo. Tamen en la biblioteko kolektiĝas kaj prunteblas ankaŭ la presita eldono. Multaj libroj kaj gazetoj komforte kaj senpage legeblas rete en skanita formo hejme sur la propra komputila ekrano. Se vi serĉas libron, vidu sub www.onb.ac.at.

En sia „Vizio 2025“ ANB priskribas sian strategion kaj pozicion por la estonteco: Libera aliro al la scio; novigo; klerigo; respondeco por la heredita scio. La tradicia “biblioteko por kleruloj” transformiĝis al “malfermita centro de la scio” en la 21-a jarcento. La kvin celpunktoj estas:

- a) La dokumentoj alireblas ankaŭ en cifereca formo;
- b) Ĉia scio en ĉia formo estas kolektata;
- c) La aliro al la scio estas pli facila;
- d) Pere de ANB esplorado estas pli multspeca kaj efika;
- e) ANB pliriĉigas la kulturan kaj socian vivon.




Kopirajto de la fotoj sur la paĝoj 10, 13, 16, 18, 19, 23, 24: ANB.

Kopirajto de la teksto kaj de la aliaj fotoj: Renate kaj Walter Klag.



La Bulteneto. Jaro 2018. Numero 13. Aŭtoroj: Walter kaj Renate Klag.

Redaktejo: 1190 Wien, Rudolfinergasse 8/11, esperanto@chello.at.



La imperiestra kastelo Hofburg en la unua distrikto de Vieno

8 ... La Pompa Salonego (Prunksaal)

13 ... Miĥaela kupolo, iama sidejo de Internacia Esperanto-Muzeo IEM

E ... Jozefa Placo (Josefsplatz)

C ... Miĥaela Placo (Michaeler Platz)

G ... Burĝa Ĝardeno (Burggarten)

Norde de C ... Herrengasse 9, Esperanto-Muzeo

Pliaj klarigoj: de.wikipedia.org/wiki/Hofburg

Fontoj – Quellen

Libroj - Bücher

Johanna Rachinger (Hg), Schatzkammer des Wissens, Wien 2018.

Harry Kühnel, Die Hofburg, Wien 1971.

Felix Czeike, Historisches Lexikon Wien, 5 Bände, Wien 1992-1997.

Wikipedia.

Filmoj – Filme

Erbe Österreich. Lebensraum Nationalbibliothek. 2018.

Aus dem Rahmen. 650 Jahre Nationalbibliothek. 2017.

Mythos Geschichte. Im Auftrag seiner Majestät - Ein barocker Bücherkrimi. 2005.



Ne realiĝis la plano konstrui centran bibliotekon en la 9-a distrikto de Vieno, Währinger Straße – Sensengasse – Spitalgasse.

Tie troviĝas hodiaŭ Arne Carlson - Parko.

El la gazeto „L’Informateur“, Wien/Paris, 1937.

© Österreichische Nationalbibliothek



Internationales Esperanto-Museum

Wien 1., Herrengasse 9

Haltestelle Herrengasse der U3

☎ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h

Donnerstag 10 bis 21 h

Esperantokurse und Führungen auf Anfrage



Im selben Haus befinden sich auch die

Sammlung für Plansprachen,

die

Musikaliensammlung

und das

Globenmuseum

Unverkäufliche, private Ausgabe – Nevendebla, privata eldono